



Esperanto en Danio

12-a jarkolekto • n-ro 1 • marto 2005



Esperanto
sproget der
åbner verden

*Rejs jorden rundt med esperanto
- verdens nemmeste sprog*

 esperanto
www.dejo.dk

La nova varb-afiŝo de DEJO

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16

✉ dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Ina Schultz (kasisto)

Jytte Sunekær (sekretario)

Ejnar Hjorth (vicprezidanto)

Bent Jensenius

Ana Røssum

Torben Svendsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 24 47 50 40

✉ eed@esperanto.dk

Presado:

Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz

Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup

☎ 32 52 19 58.

✉ ina.schultz@get2net.dk

**Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.**

**Limdato por la venonta numero:
10.05.2005**

Enhavo

Lande 3

Jarkongreso de DEA 2005 3

**Jarraporto de DEA pri agado
en 2004 4**

LA JARO 4

INFORMADO 4

INSTRUADO 7

DANA ESPERANTO-INSTITUTO .. 7

REVU-KAJ LIBROSERVO 7

EKSTERAJ RILATOJ 8

JARRAPORTOJ DE LA KLUBOJ 9

DEJO 14

Loke 18

Kopenhago 18

Århus 23

Næstved 25

Monde 26

IJK 2005 en Pollando 26

Zamenhof-tagoj 2004 en

Kaunas 27

Lande

Jarkongreso de DEA 2005

Programo

Sabate la 9-an de aprilo

- 13.00 *Alveno kaj enloĝigo*
- 14.00 *Sproglige menneskerettigheder og dræbersprog*
Prelego de dr.phil. Tove Skutnabb-Kangas en la sveda lingvo
- 15.15 *Kafopaŭzo*
- 15.35 *Kia lingva politiko por Europo kaj kiu strategio por la esperantistoj en la Europa Unio?*
Prelego de Michael Cwik
- 17.00 *Lingvo kaj komputiloj*
Prelego de Eckhard Bick
- 18.00 *Paŭzo*
- 18.30 *Festmanĝado. Trinkajoj acetebblas.*
- 20.00 *Distra vespero*

Dimanĉe la 10-an de aprilo

- 09.00 *Ĝeneralkunveno de DEA*
- 09.00 *Ĝeneralkunveno de DEJO*
- 11.00 *Ĝeneralkunveno de DEFA*
- 12.00 *Lunĉo*

Ne forgesu aliĝi!

Jarraporto de DEA pri agado en 2004

La jaro

En 2004 ni daŭrigis nian laboron en la tri agadkampoj: iinformado, instruado kaj utiligado. La plej rimarkinda evento de la jaro estis la Zamenhof-vespero la 15-an de decembro 2004 omaĝe al L. Zamenhof kaj memore al la Unesko-Rezolucio 1954 favore al esperanto, en la Pola Ambasado en Kopenhago kun la partopreno de 65 esperantistoj de DEA, DEFA, KEK kaj Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo. Ĝojige estas la pozitiva evoluo de nia membraro kiu plialtiĝis proks. 6% kompare al lasta jaro, precipe en Kopenhago. Dum la jaro aperis kelkaj artikoloj en lokaj gazetoj, i.a. intervjuo kun Peter Weide en Fredriksværk Ugeblad, artikolo pri la kurso por daŭrigantoj de Ruds Vejby en Kalundborg Folkeblad, pri la vizito de bulgaraj esperantistoj en Nordjyske Stifttidende kaj pri esperanto en Arbejderbladet. Okaze de la edziĝo de la dana kronprinco, DEA

prenis la okazon profiliĝi sin sendante du librojn de H.C.Andersen al la ĝeedza paro kaj ricevis afablan dankleteron, kiun oni povis legi en la 4-ra numero de EeD.

Informado

Esperanto en Danio

La revuo aperis 4 foje dum la jaro. Jam pasintjare ni konstatis ke la sendokostoj plialtiĝos, sed la registraro donis la eblecon al organizaĵoj peti monan helpon pro la plialtiĝo. Ni faris tion, kaj feliĉe ricevis pozitivan respondon kaj monpagon de 1010 kronoj por la sendado de 4 numeroj de EeD. La redaktoro zorgis ppor ke la enhavo estu varia kaj alloga.

Informa materialo

Dum la Karnevalo en Kopenhago oni denove disdonis la kutimajn flugfoliojn kiujn DEA presigis. La estraro daŭrigis sian diskuton pri informaj flugfolioj kaj ilia enhavo. En aŭgusto la Komerca Altlernejo de Kopen-

hago kontaktis nin proponante projekton kiun grupo de studentoj pretas fari pri esperantaj varbiloj. DEA kune kun DEJO elkore akceptis ilian proponon kaj sugestis kiel enhavo de la projekto du specoj da varbiloj: afiŝoj kaj flugfolioj. Komence de decembro ili donis al ni la rezulton kaj ni ĝojige elkovris ke iliaj rezultoj estis mirinde altnivelaj kaj taŭgaj. DEJO jam elektis unu el la rezultoj kiel varbilo en ilia kampanjo en gimnazioj en februaro/marto ĉijare, kaj DEA volas ankaŭ realigi presado de unu el la proponitaj flugfolioj.

La hejmpaĝo

Raportas Torben Svendsen

La nombroj da homoj precipe el Danio, kiuj tage vizitis la hejmpaĝon estis kreskantaj dum 2004. Laŭ la statistiko (vd. la tabelon malsupre) temas avaraĝe pri 86 vizitantoj tage en januaro ĝis 137 en

decembro. La plej popularaj paĝoj estas ekz: la librolistoj de la libroservo, la kalendaro, utilaj ligiloj, elŝutoj (download) de la retversioj (pdf-formato) de la membro-revuo - EenD. Malgraŭ la ofte malfrua sendado de tekstoj, programoj ktp al la retestro - tamen sukcesis teni la hejmpaĝon bone ĝisdatigita kaj aktualigita dum 2004. Laŭ deziro de la estraro - Esperanto Desperado komencis fine de 2004 laborigi siajn proprajn paĝojn en propra domajno kaj interreta adreso:

www.esperantodesperado.dk

al kiu nun estas informe referencan ligilon al la bando en:

www.esperanto.dk/desperado/

Kompreneble restas ankoraŭ pli da laboro por plibonigo kaj vastigo de niaj paĝoj enhance kaj stile, (precipe nia frontpaĝo) - kaj estas la espero kaj intenco, ke ni sukcesos fari tion dum 2005.

Tabelo: Ekzemplo pri la uzado de la hejmpaĝo fare de klientoj dum periodo de 12 monatoj.

Monato	Tage (averaĝe)				Monate entute					
	Trovoj	Dosi-eroj	Paĝoj	Vizi-tantoj	TTT-ejoj	Kilobajoj	Vizi-tantoj	Paĝoj	Dosi-eroj	Trovoj
Feb 2005	662	396	210	137	1691	166736	3155	4836	9119	15238
Jan 2005	629	372	231	136	2308	206132	4232	7165	11541	19517
Dec 2004	680	461	239	127	2283	647160	3954	7424	14302	21086
Nov 2004	662	477	177	86	1560	862828	2607	5315	14323	19873
Oct 2004	633	464	164	83	1667	914276	2589	5105	14410	19644
Sep 2004	661	487	191	90	1678	676969	2717	5751	14626	19846
Aŭg 2004	647	448	215	87	1547	837270	2722	6670	13908	20080
Jul 2004	525	382	176	87	1513	895189	2712	5466	11845	16291
Jun 2004	630	473	196	78	1451	1322075	2360	5894	14190	18925
May 2004	610	424	182	75	1478	583148	2345	5650	13174	18910
Apr 2004	510	365	141	71	1546	572615	2141	4235	10971	15301
Mar 2004	592	411	206	86	1728	581581	2693	6414	12767	18373
Entute ĝis 23.02.2005						8265979	34227	69925	155176	223084

Esperanto-Nyt

Ejnar Hjort raportas ke li eldonis la danlingvan revuon Esperanto-nyt du fojojn en 2004. La dua numero li sendis ankaŭ al ĉiuj kandidatoj de la EU-baloto kaj al la danaj parlamentanoj.

La kosto de tio estis pli granda ol normale, tial la revuo eldonos nur unufoje en 2005. Sed danke al la subteno de multaj legantoj, eblas daŭre sendi ĝin senkoste al politikistoj, jurnalistoj, gazetoj, gimnazioj, universitatoj kaj multaj aliaj.

Ejnar Hjort havas kelkajn ekzemplerojn de malnovaj

eldonoj, kaj se iuj deziras uzi ilin por informi pri Esperanto, li volonte sendos ilin al vi.

Europa Esperanto-Unio (EEU) kaj Brusela Komunikadcentro (BCK)

La prezidanto representis nin dum la 6-kongreso de EEU - la kunordiga organizajo de Esperantistaj landaj asocioj en la landoj de EU, kiu okazis en Bilbao. La kongreson ĉeestis 14 danaj esperantistoj. Dum la kongreso kunvenis la reprezentantoj de la aliĝintaj landoj kaj oni decidis kaj akceptis novan statuton kun juna personeco laŭ la belga leĝo.

BCK (Brusela Komunikad-centro) faras efikan laboron, sed ili dependas de financa subteno por efike daŭrigi la laboron agadi je europa nivelo kaj informi nin pri lanĉitaj kampanjoj kaj sciindaĵoj ĉirkaŭ lingvorilataj temoj. Eŭropa Bulteno, la oficiala organo de EEU aperas suplemente al la revuo La Ondo de Esperanto.

Instruado

Ankaŭ en 2004 DEA aranĝis konversacian kurson por daŭrigantoj, tiu ĉi foje sub lerta gvidado de Peter Weide. Ĉeestis 12 lernantoj, i.a. 2 lektoroj de RUC, unu el kiuj informis nin ke kelkaj studentoj de RUC havas deziron daŭrigi la studadon de esperanto. KEK aranĝis kursojn por komencantoj kaj daŭrigantoj. Ni celas starigi sekcion de ILEI por la instruistoj. KEK sukcese aranĝis porkomencantaj kaj pordaŭrigantaj kursoj kiuj komencis aŭtune kaj daŭrigis dum la vintra sezono (vidu ilian raporton).

Dana Esperanto-Instituto

Raportas Lars Kromann

En 2004 bedaŭrinde nur 8 novaj personoj venis al niaj kursoj kaj nur 17 personoj petis pri kurs-informoj aŭ pri esperanto. 4 personoj finis la kursojn. Ni ne scias pri la kaŭzo de la malgranda partopreno, sed eble kaŭzas la bonegaj kursoj en la Interreto la rezulto. Sed niaj kursanoj estas scivolemaj personoj, kaj ni havas multajn diskutojn kaj pri esperanto kaj pri lingvaj aferoj. Tamen, - ni daŭrigas nian laboron, kaj havas 4 diversnivelajn kursojn kaj eldonas senpagajn kajerojn pri fonetiko, gramatiko (dana kaj esperanta) kaj malgranda vortolisto.

Revu-kaj Libroservo

Raportas Arne Casper

2004 estis jaro kun iom kreskanta vendo. La sumo de la disvendado estis ĉirkaŭ 12.000 kronoj, el kiu la plejparto koncernas lernolibrojn kaj vortarojn. Ĝojiga altigo de la membronombro, ĉefe en la ĉefurbo kaŭzis tion.

Ni estas ŝajne ankoraŭ malakcelitaj pro la granda diferenco de aldonvalora imposto en EŬ - kiu fakto plikostigas la librojn por ni en Danio.

Dum 2004 Frederik Eriksen, por manko da tempo pro sia studado, forlasis la revuservon, kaj tiu tasko estis transprenita de la Libroservo, kiu ŝanĝis la nomon kaj nun estas Revu-kaj Libroservo. Antaŭe la Libroservo prizorgis nur la financon parton de la tasko. Tiu procedo estas realigata kaj ni aldonis novajn revuojn al la listo: Naturista Vivo kaj La Gazeto. La plej popularaj revuoj estas Monato kaj La Ondo de Esperanto. La Revuservo disvendas por ĉirkaŭ 15.000 kronoj, sed Arne volontege bonvenigas ĉiujn novajn abonantojn por la jaro 2006, kaj instigas legi pri la abono en la aŭtuna numero de Esperanto en Danio.

Eksteraj rilatoj

La dana UN-unuiĝo

Laŭ propono de UEA, la prezidanto sendis la tradukitaj Pekina deklaro kaj la rezolucio de la Rezolucio Nitobe i.a. al

la dana UN-unuiĝo. La respondo estis malagraba legado: ili agnoskis la lingvaj problemoj en la internaciaj rilatoj kaj emfazis la gravecon persisti la 6-oficialaj lingvoj uzataj en UN, sed ili opinias ke la angla lingvo estas la plej taŭga kiel helplingvo kaj ne povas apogi la enkonduko de nova neŭtrala lingvo! La respondo subskribita de la ĝenerala sekretarino de la asocio alvenis du tagojn antaŭ nia prezidanto partoprenis la jarkunvenon de la dana UN-unuiĝo en oktobro 2004. Dum la jarkunveno Ileana Schröder prenis la okazon alparoli la UN-asocian prezidantaron kiu estas relative novelektita, alfronti ŝin pri la respondo, konstatante ke la prezidantaro nek konas niajn konsultaj rilatojn, nek la Unesko-rezolucio. Ni interkonsentis kunveni, por pridiskuti pli taŭgajn rilatojn inter la du asocioj. La kunveno okazis en februaro. La konkludo estas ke ni devas esti pli videblaj ankaŭ en tiu kampo.

Jarraportoj de la kluboj

Konversacia Esperanto-Klubo (Kopenhago)

Raportas Jytte Sunekær:

La membronombro estas 65, kiu dividiĝas jene: 55 aktivaj, 6 familiaj, 3 pasivaj kaj 1 honora.

Maria Henriksen forpasis.

- La estraro kunvenis 5 fojojn.
- La dan-sveda laborgrupo kunvenis 2 fojojn: en Helsingburgo (7an fojon) kaj ĉi tie en Kopenhago (8-an fojon).

Nia organo Kontaktilo pere de PONTO aperis 6 fojojn.

Ĉiulunde ni kunvenas kune kun la fervojistoj. Ni interkonsentas pri la aktivecoj kaj la surloka ekonomio. defakek@hotmail.com estas nia komuna klubadreso.

- Funkciis vintra programo kun porkomencantaj kaj pordaŭrigantaj kursoj, studgrupo kaj H.C.Andersen-temaj lego- kaj tradukgrupo.
- Variaj programoj okaziĝis. Multaj eksterlandanoj vizitis la klubon kaj eĉ prelegis aŭ almenaŭ distris nin.
- Pri la somerekskurso: Ni

sekvis la ŝpuron de H..Andersen, kiu en 1829 eldonis romanon kun titolo "Pied-vojaĝo de Holmens Canal al la orienta pinto de Amager".

- Ni vojaĝis al Aalborg por jarkunveni tie. - Unuopaj UK-is en Ĉinio. - Kelkaj el ni vojaĝis al Hispanio por la EEU-kongreso en Bilbao.

- Esperanto Desperado distris dum la pentekosta karnevalo.

- Ni ĉeestis la DEA-iniciatan eventon en la pola ambasadejo, kie ankaŭ venis homoj, kiujn oni malofte vidas.

- El la biblioteko ni fordonacis 255 librojn al Roskilde Universitetsbibliotek. Rapide la stoko estis ordigita, tiel ke ĉiuj nun havas eblecon prunti librojn el ties sistemo.

Næstved

La traduklaboro de H.C. Andersen-fabeloj daŭris en 2004, kaj nun alproksimiĝas la naskiĝdatreveno, la 2-an de aprilo. Ni decidis ne eldoni libron kun la tradukoj, sed enmeti ilin en hejmpaĝo. Lars Kromann Jensen daŭre laboras per tiu grandega laboro. Samtempe Birthe Trærup agas

kvazaŭ paralele en i.a. universitataj rondoj kun aliaj partoj de la HCA-verkaĵoj (Bildlibro sen bildoj, Danco de derviŝoj).

El danaj prelegoj - ofertitaj al Næstved-anoj pere de lokaj gazetoj kaj radioj (vidu la DEA-kolekton de gazet-eltondaĵoj) - ni mencias: en januaro Lene kaj Jan Niemann pri "Naturo, kulturo kaj kapuĈino", en februaro Ileana Schrøder pri agadoj de DEA, en marto Liss-Lotte Talbro pri Litovio kaj Birthe Trærup pri la pentristo Elias Petersen, en oktobro Hans Jørgen Kristensen pri trajnvojaĝo de Pekino al Moskvo kaj fine en novembro denove Lene kaj Jan Niemann pri Svalbard. Antaŭ Ĉiuj prelegoj ni kune manĝis dank' al Bvente, kiu prizorgis tion. Ĉefa kaŭzo de tiuj prelegoj estas emfazi kulturan kaj seriozan aspektojn de nia movado.

En junio ni ekskurzis al Lolland, bona tago malgraŭ la ne tre bona vetero, kaj en septembro vizitis nin 3 bulgaroj kun iliaj 2 gastigantoj el Jutlando, ankaŭ kun komuna manĝado antaŭe.

En aprilo TV2 Øst kontaktis

nin, certe pro nia elsendo de Esperanto-nyt. Ni supozis, ke la ĵurnalisto intencis rakonti pri esperanto ĝenerale, kaj invitis kelkajn Kopenhaganojn kiel helpilojn, sed la ĵurnalisto koncentriĝis pri la traduklaboro pri HCA. Vidinda, mallonga elsendo estis la rezulto.

La poŝta reklamilo "Esperanto - et mellemfolkeligt sprog" funkciis dum la tuta jaro; en 2005 same.

Kiel en 2003 ni ankaŭ Ĉijare sendis Esperanto-nyt al pli ol 80 adresoj - multekosta afero ĝi estas, sed espereble ne vana, rigardante la longan perspektivon.

Fine de la jaro ni ricevis oferton de la biblioteko de Sct. Jørgen, ke ni komence de 2005 rajtas ekspozicii tie pri HCA, kaj en novembro 2005 okazos voĈlegado en pluraj lingvoj de HCA-fabelo, i.a. en esperanto. Nia novaĵletero aperis 4-foje, la estraro kunvenis 4-foje, nombro de aranĝoj estas 21 (unu nuligita pro malsano), kaj meza nombro de partoprenintoj estas 8,7.

La klubo havas 21 membrojn kiel pasintjare.

Dankon al ĉiuj, kiuj ebligis

nian agadon.

Århus Esperanto-klubo

Raportas Stanislaw Mielczarek

La ĵus pasinta jaro 2004 ne estis tro bona, precipe kiam ni pensas pri la terura kataklismo en Azio. Ni esperu, ke ĉiuj bonvolaj homoj pretos helpadi al la suferintoj.

La jaro 2004 tamen estis sufiĉe bona por nia klubo. Ni perdis nur unu membron, nome Erik Kjær, kiu pro multaj aliaj taskoj malmembriĝis. Do, ni estas nun 31 klubanoj.

Ni havis 12 kunvenojn:

La 29-an de januaro vizitis nian klubon Ileana Schrøder, la prezidantino de Dana Esperanto-Asocio. Ni spertis, ke la prezidantino estas tre energia kaj sufiĉe optimisma koncerne la E-movadon en Danio. Ŝi prezentis siajn ideojn rilate al la estonto de la dana Esperanto-movado. La prezidantino informis nin ankaŭ pri Esperanto-kurso en Roskilde Universitetscenter.

La ekonomia situacio de Dana Esperanto-Asocio bedaŭrinde ne estas tro bona. Estas dezirinde, ke ni ekhavu pli da

membroj. Tamen ni ĉiuj konstatas, ke estas tre malfacile "kapti" novajn adeptojn de Esperanto en la moderna mondo plena de amaskomunikiloj ktp. Inter 13 klubanoj, kiuj ĉeestis la kunvenon estis ankaŭ Bent Holm Laursen, kiu reklamis la "senpagan telefonabonon", kiu povus doni flankan profiton al Dana Esperanto-Asocio.

La 26an de februaro 2004 okazis ĝenerala kunveno. Komence ni honoris per unuminuta silento nian mortintan membron Jenny Jørgensen. Ni ankaŭ kore dankis al la multjaraj aktivuloj: Tove Jyding, Henry Simonsen kaj Arthur Robinson, kiuj pro la aĝo kaj sanstato ne plu deziris esti estraranoj. La estraro konsistis do en la jaro 2004 el: Stanisław Mielczarek - prezidanto, Grethe Kvist - kasistino, Jørgen Kristoffersen, Nikoline Fiora kaj Byrial Jensen - estraranoj. Wolfgang Kirschstein estis anstataŭanto. La revizoroj estis Agnete Kristoffersen kaj Arthur Robinson. Tove Jyding funkciis kiel anstataŭanto.

La 25-an de marto ĉiu el ni

starigis al si mem la demandon: "Ĉu mi mem povas diri: mi parolas Esperanton?". La demando montriĝis malfacila. La maloftaj kunvenoj en la klubo kaŭzas, ke nia scipovo de Esperanto malboniĝas. Ni devus ekzerci multe pli!

La 29-an de aprilo la temo de la kunveno estis: "La nova Eŭropa Unio". Ni diskutis plusojn kaj minusojn de ĝi. Laŭ la lasta raporto de EU-Komisiono la elspezoj por tradukado pli altiĝis je 60 procentoj ĝis pli ol 1 miliardo da eŭroj. Ĉu ne estas la tempo por enkonduki Esperanton en EU?

En majo, la 27-an, venis Jonas kaj Mathias Dalmose kaj distris nin per bela muziko. Estas tre ĝojinde, ke tiuj du junuloj dum mallonga tempo ellernis bonege la internacian lingvon kaj krom la muzikado estas tre fervoraj esperantistoj. Koran dankon al ili!

Nian kutiman somerekskurson ni faris la 5-an de junio. La celo estis Randers Regnskov, kie ni povis admiri naturvidindaĵojn. Ni havis ankaŭ plezuron gratuli al Agnete Kristoffersen, kiu

ĝuste tiun sabaton havis naskiĝtagon!

La 5-an de aŭgusto Søren Dalmose estis intervjuita de la programo "De sprøde Heste", kiun DR, pr. III dissendis el la muzikfestivalo en Skanderborg. Inter alie li estis petita traduki kelkajn frazojn por doni al la aŭskultantoj impreson kiel sonas Esperanto. La vintra/printempa sezono en nia klubo komenciĝis la 30-an de septembro. La temo de la vespero estis: "Mia ferio". Ni rakontis pri niaj ferioj – amuza vespero, bona okazo por praktiki la lingvon.

En oktobro, la 31-an, Bent Holm-Laursen venigis tri gastojn, nome reprezentantojn de Association for World Education and Humanity, kiuj rakontis pri la organizaĵo kaj pri la helpprojekto en Nairobi, Kenjo, kies la celo estas helpi al la tieaj stratinfanoj.

Poste venis raportetoj pri niaj feriaj vojaĝoj. Mathias Dalmose ekzemple rakontis, en bonega Esperanto, pri vojaĝoj al Svedio, Ruslando, Italio kaj Hispanio, kie Jonas kaj Mathias ludis je gitaro kaj violono dum diversaj Esperanto-aranĝoj. Bent

Holm-Laursen vizitis Portugalion kaj Hispanion, kie li renkontis tieajn esperantistojn. Stanisław Mielczarek rakontis pri sia restado en pola sanatorio.

La 25-an de novembro ni havis "astronomian" vesperon. Byrial Jensen klarigis al ni la fenomenon de la luneklipso. Oni devas havi "matematikan" cerbon por kompreni tiajn aferojn. Byrial sendube posedas multflankan cerbon!

Poste Bent Holm-Laursen donis al ni informojn pri la venonta Universala Kongreso de UEA en Vilnius.

Nia tradicia Kristnaska kaj Zamenhof-festo okazis la 16-an de decembro, dum kiu ni trinkis varman vinon kun spicaĵoj, aŭdis "Knabineton kun alumetoj" de H.C. Andersen, kiun voĉlegis Mathias Dalmoose, ludis, kantis ktp. La feston ĉeestis ankaŭ germana samideanino. Tran-kvila, gaja kaj ujutna vespero.

Koran dankon al vi ĉiuj - gastprelegantoj kaj membroj de Århus Esperantoforening, por la bona kunlaboro en la jaro 2004.

Vejle-Fredericia

Raportas Holger Jensen

En la pasinta jaro ni havis jenajn aranĝojn:

La 13-an de marto okazis ĝenerala kunveno, kun komuna manĝado, kun partopreno de 14 membroj. La estraro estis reelektita.

En majo, la 28-an ni ekskursis al la domo de Jacob kaj Minka ĉe Vejle,. Partoprenis 10 membroj.

En decembro, la 11-an ni aranĝis Zamenhoffeston kaj tradician julemikon kun manĝo kaj ludoj kun partopreno de 15 membroj.

Krome, la estraro kunvenis plurfoje dum la jaro.

Nordjutlanda Esperanto Klubo.

Raportas Ejnar Hjort

Ni havas nur du studgrupojn, unu en Aalborg kaj alia en Hobro.

Bedaŭrinde ni ne sukcesis starigi kurson por komentoj, eĉ se ni metis afiŝojn diversloke, en la universitato kaj sur tabuloj en butikoj ktp. sed neniuj reagis.

Ni havis viziton de gastoj el Bulgario kaj Japanio.

DEJO

*Raportas Rasmus Høyrup
Jensen*

Enlandaj aranĝoj

Ĝenerale ni povas emfazi, ke la aktiveco de la lasta jaro estis sub la signo de kreskado. Ni organizis kaj plifortigis la asocion. Ni decidis tion fari dum la strategia kunsido en Ålborg en aprilo 2004. Unu el la unuaj decidoj estis aktivigi pere de la retgrupo deĵo-dk, kiel la centra ilo en la organiza proceso. Ni uzas la retliston kiel ĝenerala komunikilo kaj kiel depono de gravaj informoj, kalendaro, kampanja ilo k.t.p. Nia hejmpaĝo kreskas kaj enhavas kalendaron kie ĉiuj uzantoj povas enmeti aranĝoj.

Kluba vivo

La klubaj renkontiĝoj revigliĝis, kaj ĝenerale ni havis preskaŭ regulaj aranĝoj de somere. Kutime la klubo fariĝis ujutna renkontiĝa kunigo por la aktivuloj - estas nur bedaŭro ke ni ne povas kolekti ĉiujn grupanoj pro la geografia distanco. Tamen ni klopodis havi klubaj aranĝoj kun gastoj de Portugalio,

Germanio, Francio kaj Rusio.

Informa kampanjo

Dum la strategia kunsido ni prenis decidojn, kiujn ni poste atenteme sekvis. Nun ni faras informan kampanjon direktita al Kopenhagaj gimnazioj, pere de afiŝoj, flugfolioj kaj vizito al gimnazioj, kie ni prezentas esperanton dum aranĝitaj kunvenoj. La statistiko de la vizitado en nia hejmpaĝo momente kreskadas. La kampanjo estas projekto por atingi spertojn por plani pli grandan kampanjon venontan aŭtunon, kiam nia celo estas informa kampanjo al ĉiuj enlandaj 274 mezlernejoj.

Kristnaska renkontiĝo

Fine ni ujutne renkontiĝis por kristanska lunĉo kun glaseto da brando kaj glitkurado.

Eksterlandaj aktivecoj

Entute 10 danaj junuloj ĉeestis IJK kaj IS.

IJK en Kovrov, Rusio

Ni forte eniris Rusion tere, mare kaj aere de kvar-kvin direktoj. Ni restis tie tiom longe, kiel nia tempo, mono kaj nia vizo elpermesis, kelkfoje pli longe. Novaj amikecoj elstariĝis dum la

kongreso. Ĉeestis multaj rusoj kaj ili estis tre scivolemaj. Nur unufoje okazis ke unu el ni devis foriri de la aŭtobuso pro okazaĵo, kun oni plej bone povas nomi rememoraĵo de malnova tempo - kaj tiu donis al ni uzeblan komparon al la tempo, antaŭ la muro falis. Post la kongreso la amikeca etoso daŭrigis, kaj ĉie en la lando la rusaj esperantistoj varme akceptis nin malfermite siajn domojn. Ni pasigis multajn belajn tagojn kaj noktojn en Moskvo kaj Sankta Petersburgo. Ho, ve, multaj el ni sopiras reveni tien!

IS en Wetzlar, Germanio


Dum IS en Germanio ni renkontiĝis kun multaj el niaj rusaj amikoj, sed la kongresa enloĝado estis tre malbona kun troplenigita komuna loĝejo. Du pluraj ĉambroj tute ne sufiĉis. Alie estis bona kaj riĉa programo. Mi mem partoprenis en tre interesa seminario pri konfliktsolvo, kie ni i.a. designis idealan strandon pere de sep manoj sur unu kolorkrajono. La vespera programo estis tre varia, kun tre altkvalita teatra vespero farita de grupo de Toulouse,

kiu preparis sin dum unu jaro. Estis ankaŭ diskoteko, kiu pro iu mistera kaŭzo ne estis tiel frekventata. Alia problemo estis muziki en la trinkejo, kun neesperantistajn servistojn. La trinkejo situis en la centra parto de la festa atmosfero, kaj tiu fakto havis kelkfoje maloportunajn konsekvencojn, ĉar la manko de kontrolo kaŭzis pezan atmosferon. Tamen la partoprenantoj vigle interbabilis kaj amuzis sin! Oni ludis variajn ludojn ĝis la malfruaj horoj de la nokto, kaj precipe la ludo "lupohomo en la vilaĝo" estis tre populara kaj densa kun 15-20 partoprenantoj.

Noll regnskab 2004


<i>Indtægter</i>	<i>Kr.</i>	<i>Udgifter</i>	<i>Kr.</i>
4% af DEAs individuaj og gaver	520,20	Gravsted	696,69
Renter	<u>3.976,00</u>	Kurstab	159,04
		Overskud	<u>3.640,47</u>
I alt	<u>4.496,20</u>	I alt	<u>4.496,20</u>

<i>Aktiver</i>	<i>Kr.</i>	<i>Passiver</i>	<i>Kr.</i>
Obligationer	59.287,84	Egenkapital	60.162,58
Bank	<u>4.515,21</u>	Overskud	<u>3.640,47</u>
I alt	<u>63.803,05</u>	I alt	<u>63.803,05</u>


Ileana Schrøder
Formand


Ina Schultz
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden


Jacob Norfolk
Revisor


Alexander Kogan
Revisor

DEA regnskab 2004

Indtægter	Kr.
Klubber kontingent	11.460,00
Individuaj 2003	4.960,00
DEJO	585,00
Gaver	7.459,99
Renter	<u>5.926,02</u>

I alt indtægter DEA 30.391,01

Indtægter Libroservo 4.322,74

I alt indtægter 34.713,75

Udgifter	Kr.
Administration	982,50
Porto	461,00
Gebyrer	351,00
Bestyrelsesmøder	0,00
UEA og EEUkontingent	2.409,00
Arrangementer	3.687,00
Årsmøde udgifter	103,03
E. en Danio	13.008,93
Repræsentation	331,75
Tilskud	1.412,25
Kurstab	236,04
4% til Noll	<u>520,20</u>

I alt udgifter DEA 23.502,70

Overskud DEA 6.888,31

Overskud Libroservo 4.322,74


I alt udgifter 34.713,75

Aktiver	Kr.
Obligationer fore.	87.992,34
Libroservo	41.609,74
UEA kontoen	558,17
Kassekonto	0,00
Amagerbanken alm.	19.286,88
Girobank alm.	<u>1.715,00</u>

151.162,13


Passiver	Kr.
Egenkapital primo	106.103,41
Årets overskud DEA	6.888,31
Årets overskud Libroservo	<u>4.322,34</u>
Egenkapital ultimo	117.314,06
Perspektivo	32.948,07
Kreditorer	<u>900,00</u>

151.162,13



Ileana Schrøder


Formand




Ina Schultz

Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, ^{overstadisk} Der er taget enkelte stikprøver af bilagene.


Jacob Norrøp
Revisor


Aleksander Kogan
Revisor

København, den 14.2.2005

Loke

Kopenhago

Interreta aliro ekzistas en la klubejo ĉiulunde, kaj eblas por la klubo sendi kaj ricevi interretmesaĝojn, ĉar nun ni havas interretadreson:
defakek@hotmail.com

Rakontu pri tiu adreso al viaj esperanto-rilatuloj. Ni esperas, ke tio faciligos kontakton inter la kopenhagaj esperantistoj kaj la tuta mondo.

La unuan lundon de la monato ni kune vespermanĝas 18.30 - kunportu mem viajn buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth, tel. 36 46 62 79.

Pri kursoj kaj studgrupoj - jen nia oferto:

Kurso:

Kurso por komencantoj ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45 de 3/1 ĝis 14/3

Legogrupoj kaj studgrupoj:

Arne Casper estras legogrupon (temo: La fabeloj de H.C.Andersen) ĉiulunde 19.00-19.30 kaj 20.00-20.45 3/1 ĝis 7/3.

La du studgrupoj funkcias ĉiun duan lundon - 3/1, 17/1, 31/1, 7/2, 28/2 kaj 14/3 - 20.00-20.45 kaj 21.00-21.45.

1: Ni daŭrigas la laboron pri la libro de Kolker: 'Vojaĝo en Esperanto-lando' -voĉlegado, tradukado (se necese), diskutado, lingvaj interesaĵoj

2: Ni daŭrigas ankaŭ la laboron pri H.C.Andersen-fabeloj, kiun ni pasintvintre komencis.

Gvidantoj Bent kaj Lene.

La kondiĉo por partopreni kurson, legogrupon aŭ studgrupon estas membreco de unu el tiuj kluboj: KEK, DEFA Kopenhago, DEJO. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen (DEFA) kaj Arne Casper (KEK).

14/2 - Kursoj

KEK ĝeneralkunveno

Post la generalkunveno 14 februaro -05 la estraro aspektas jene: Kim Henriksen, prezidanto; Jytte Sunekaer; Bent Jensenius; Arne Casper; Egon Starup-Jensen; anstataŭantoj Ana Røssum kaj Zita Carbaraviciene.

21/2 - Kursoj

DEFA Kopenhago membrokunveno

28/2 - Kursoj kaj studgrupoj

7/3 - Kursoj kaj kantvespero

14/3 - Kursoj kaj studgrupoj

21/3 - Jan rakontos pri vizito en Svalbard, la plej norda Norvegio

28/3 - pro pasko neniun kunveno

30/03: "Du prezentoj - H.C.Andersen - kaj pri la 5-jara datreveno de KEKG". Okazos generalkunveno de KEKG de la 18.00 gis 19.15

4/4 - Kim Henriksen prelegos:

Esperanto-muziko dum la lastpasintaj 15 jaroj

11/4 - Pri la ĵus okazinta (9/4-10/4) Dana Jarkunveno

18/4 - Rakontu pri vojaĝtravivaĵo kaj montru kelkajn fotojn

25/4 - Taskoj kaj enigmoj

2/5 - H.C.Andersen - la laboroj en la klubo rilate al la naskiĝtago.

Birthe Trærup kontribuos

Ŝanĝoj povos okazi.

La dana poeto Poul Thorsen

iĝis 90-jara la 7-an de januaro. Korajn gratulojn!

Iam li estis tre aktiva diversmaniere. Li verkis literaturon, kunredaktis en diversaj revuoj, recenzis, aktoris, tradukis kaj instruis pri fungoj.

Jen listigo de *nur kelkaj* el liaj agoj.

1954. Prezidanto de la landa *komunkomitato* (Laborista Esperanto Klubo; Komuna Konversacia Klubo; Studanta Esperanto Klubo; Kristana Esperantista Ligo; Klubo por Infanoj kaj Gejunuloj kaj Kopenhaga Esperantista Klubo)

1956. Tradukis kaj eldonis satirajn poemetojn de Piet Hein: Kumbel, GRUK

1960. Verkis kaj eldonis poemetojn PLUK

1995. Stokita vino

1996. Babile kun mi mem.

Tradukis historion de Hans Christian Andersen: Plum-Johano.

Li multe vojaĝis uzante esperanton. Tio inspiris lin en siaj multaj artikoloj. Eĉ nian fifaman *Christiania* li vizitis celante raporti al revuo pri tiu sovaĝa izolita loko.

Lia edzino kaj li iniciatis *Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen*, kiun UEA administras. Ĉiun jaron ni povas legi pri bibliotekoj, kiuj ricevis librojn por grandaj sumoj. Jam 8 fojojn oni disdonis laŭ ricevitaj petoj.

Poul verŝajne estas la plej sperta esperantisto en Danio.

Jytte Sunekær

Zamenhof-festo en la pola ambasadejo

Krom la tradiciaj decembraj Esperanto-aranĝoj en Kopenhago, ĉi-jare okazis la 15-an de decembro solena Zamenhof-festo en la pola ambasadejo memore al la 50jara datreveno de la rezolucio de Unesko. Partoprenis 64 esperantistoj kaj gastoj, interalie Robert Phillipson kaj Tove Skutnabb-Kangas. La formala parto okazis dulingve; la interpretadon inter Esperanto kaj la pola prizorgis la

poldevenaj esperantistoj Stanisław Mielczarek kaj Eugeniusz Rybarczyk.

La feston enkondukis la ambasadorino, Barbara Tuge-Erecińska, kiu per sia parolado rivelis bonan konon de nia movado. Sekvis bonvenigo fare de la prezidantino de DEA, Ileana Schröder, kies parolado akcentis la idean flankon de Esperanto. Tiam Mogens Rude Andersen parolis pri “Doktoro Zamehof kaj Unesko” – resumante la enhavon de siaj du eminentaj prelegoj en la Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo en decembro kaj januaro.

La formalan parton finis muziko prezentata de Kim Henriksen kaj Andreo Mielczarek, deklamo de la Zamenhofa poemo “Ho mia kor” fare de Birthe Lapenna, kaj komuna kanto de la himno. Laste la partoprenantoj iris al alia ĉambro por akcepti oferton de trinkaĵoj en agrabla, neformala atmosfero.

Rememoro pri Lapenna

Lige al la prelegoj de Mogens Rude Andersen pri la okazaĵoj en Montevideo 1954, Birthe Lapenna retrovis leteron skribitan al s-ino Kirsten Zacho, kiu forpasis la 17-an de januaro 1975 - preskaŭ du monatojn antaŭ ol prof. Cao skribis la leteron. Cetere, li konis nek Kirsten Zacho nek la rilaton inter Ivo Lapenna kaj la familio Zacho, kion vi komprenas legante la leteron.

Montevideo, la 3-an de marto, 1975

F-ino Kirsten Zacho
København / Danlando

Altestimata samideanino,

Hodiaŭ matene mi ricevis du numerojn de "KURIERO" (7 kaj 9/1974) kun koncernaĵoj, kiujn vi bonvolis sendi al mi. Koregan dankon !

Mi gratulas vin kaj la ceterajn samideanojn de KKK kaj SEK (KKK/SEK), kiuj per kuraĝa decido eksiĝis el UEA, kvankam tiu eksiĝo, kune al aliaj samspecaj signifas grandan perdon por la movado ĝenerale - mi parolas pri la -neŭtrala movado.

Post la okazintaĵoj en la Hamburga Kongreso, mi tuj eksiĝis el UEA. Nia Urugvaja Esperanto-Societo, post pristudo de la situacio, ankaŭ decidis eksiĝi kaj jam komunikis al la nova Prezidanto de UEA tiun gravan paŝon. La leteron de Prof. D-ro Lapenna pri la kaŭzoj de lia eksiĝo ni aperigis kiel aldono al nia bulteno "Noticias del Esperanto" (en hispana lingvo). ...

Mi nenion diras pri Prof. D-ro Lapenna ĉar ĉiuj miaj opinioj pri li koincidas kun la viaj. Mi havis la grandan honoron akompani D-ron Lapenna okaze de la 8-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo, en 1954 (tiam mi estis sekretario de nia UES) kaj eble scias pli, multe pli ol iu ajn esperantisto en la mondo, pri la teruraj momentoj de li travivitaj tie ĉi dum la Konferenco; pri lia senlaca laborado - tage kaj nokte - kaj pri lia HONESTEGA SINTENO al nia Movado. La Sukceso de E-to en tiu Konferenco estas nepre rezulto de la lerta, diplomatia kaj vigla agado de D-ro Lapenna.

Nun, mi kaj aliaj esperantistoj ĉi-tieaj esperas, ke la vera NEŬTRALA movado reorganiziĝas en Eŭropo (en aliaj kontinentoj ne ... estas sufiĉe forta), por denove gvidi la agadon en la Mondo sur kunordigita unueca bazo.

Ĉiam je via dispono, kun plej alta estimo,
Victor Luis Cao



La publiko rigardas dum la paŭzo la klarigajn afiŝojn kiujn M. Rude Andersen surmurigis antaŭ sia prelego

Århus

Prezidanto: Stanislaw Mielczarek, Skovgårdsvænget 125, 8310
Tranbjerg J.; tel/fakso 86 29 23 06, retpoŝto stanis@ofir.dk.
Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.
Kunvenoj: je la 19:30 h.

*Feliĉan kaj prosperan Novjaron 2005 al la membraro de
Århus-a Esperanto-klubo deziras la estraro*

Okazos:

31.03: 200-jara datreveno de la naskiĝo de la mondfama
fabelverkisto – Hans Christian Andersen.

28.04: "Vjetnamo" - la prezidanto de Dana Esperantista Fervojista
Asocio, Jan Niemann, rakontos pri sia vojaĝo al tiu fora lando.

26.05: "Sanatorioj en Pollando"- Stanisław Mielczarek.

04.06: Somera ekskurso. Ni ekskursos al la bela regiono de
Ry/Silkeborg.

Okazis:

La 5-an de aŭgusto Søren Dalmose estis intervjuita de la programo
"De sprøde Heste", kiun DR, pr. III elsendis rekte el la
muzikfestivalo en Skanderborg. Inter alie li estis petita traduki
kelkajn frazojn por doni al la aŭskultantoj impreson kiel sonas
Esperanto.

La vintra/printempa sezono en nia klubo komenciĝis la 30-an de
septembro. La temo de la vespero estis: "Mia ferio". Ni rakontis pri
niaj ferioj – amuza vespero, bona okazo por praktiki la lingvon.

En oktobro, la 31-an, Bent Holm-Laursen venigis tri gastojn, nome
reprezentantojn de Association for World Education and Humanity,
kiuj rakontis pri la organizaĵo kaj pri la helpprojekto en Nairobi,
Kenjo, kies la celo estas helpi al la tieaj stratinfanjoj.

Poste venis raportetoj pri niaj feriaj vojaĝoj. Mathias Dalmose
ekzemple rakontis, en bonega Esperanto, pri vojaĝoj al Svedio,

Ruslando, Italio kaj Hispanio, kie Jonas kaj Mathias ludis je gitaro kaj violono dum diversaj Esperanto-aranĝoj. Bent Holm-Laursen vizitis Portugalion kaj Hispanujo, kie li renkontis tieajn esperantistojn. Stanisław Mielczarek rakontis pri sia restado en pola sanatorio.

La 25-an de novembro ni havis "astronomian" vesperon. Byrial Jensen klarigis al ni la fenomenon de la luneklipso. Oni devas havi "matematikan" cerbon por kompreni tiajn aferojn. Byrial sendube posedas multflankan cerbon!

Poste Bent Holm-Laursen donis al ni informojn pri la venonta Universala Kongreso de UEA en Vilnius.

Nia tradicia Kristnaska kaj Zamenhof-festo okazis la 16-an de decembro, dum kiu ni trinkis varman vinon kun spicaĵoj, aŭdis "Knabinekon kun alumetoj" de H.C. Andersen, kiun voĉlegis Mathias Dalmoose, ludis, kantis ktp. La feston ĉeestis ankaŭ germana samideanino. Trankvila, gaja kaj ujutna vespero.

27.01: La tuta mondo spertis, ke homoj estas senpovaj je naturkatastrofoj. La lasta tragedio en Azio kortuŝis nin ĉiujn. La temo: "Ĉu vi spertis iun danĝeran situacion en via vivo?" vekis interesan diskuton. Montriĝis, ke neniuj klubanoj estis en iu vivdanĝera situacio. Tamen kelkaj el niaj klubanoj povis rakonti pri almenaŭ ne tro agrablaj situacioj. Ekzemple Søren Dalmoose estis en Izraelo pro pluvego preskaŭ detranĉita de la mondo sur eta "insulo", Luja Miletić travivis maltrankvilajn momentojn en iu malgranda aviadilo, Agnete Kristoffersen iam subite ekrimarkis, ke la flosa debordiĝis tro longen kaj Stanisław Mielczarek dum la unua flugo en sia vivo travivis kune kun sia filo dum la rondflugo en Legoland ankaŭ malagrablajn momentojn.

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, tel 5572 1240, rete atingebila pere de: eho-esperanto@stofanet.dk

La kunvenoj okazas principe ĉiun duan vendredon en Grønnegades kaserne, Grønnegade 10, lokalo 111, ekde h 19.30.

Okazos:

Ve 11.03 - Klubvespero, dum kiu ni laboras pri temo(j) laŭ deziro de la ĉeestantoj.

Ve 18.03 - Danlingva prelego, verŝajne pri la buŝo de la rivereto *Suså* kiel 'haveno' dum la tempoj. (Detaloj ankoraŭ mankas).

Ve 08.04 – Sezonfino en ujutna maniero.

Okazis:

La 10an de decembro okazis kristnaska aranĝo kun spicita ruĝvino, kubĵeta ludo kaj spektado de desegnaĵ-filmo pri *La novaj vestoj de la imperiestro*.

La 7an kaj 21an de januaro okazis klubvesperoj kun diversaj laboroj, i.a. pri la HCA-tradukoj.

La 28an de januaro Ib Nielsen, Køng, rakontis pri Niels Ryberg kaj lia establo de kultivo kaj preparo de lino por posta teksado de tre elegantaj tolaĵoj, i.a. liveritaj al la reĝa kortego. Kontentiga nombro de 'eksteruloj' ĉeestis.

La 11an de februaro ordinara klubkunveno.

Ekspozicio en biblioteko

Dum kelkaj semajnoj en januaro-februaro ni ekspozicias HCA-librojn en Esperanto en vitra montrokesto en la biblioteko de Sct Jørgen, kaj sabate la 4an de novembro la ĉefa biblioteko okazigos voĉlegon de *La malbela anasido* en pluraj lingvoj, inter kiuj Esperanto.

Monde

IJK 2005 en Pollando

La Loka Kongresa Komitato de la 69a IJK komunikas:

Jam 240 personoj aliĝis al Internacia Junulara Kongreso 2005 en Pollando!

La laŭvica aliĝanto povas esti ĝuste vi! Kial ne destini semajnon el via somero por veni al la belega, montara, senkula urbo Zakopane? La kongresa temo estas "Unueco en diverseco". Rigardu tie unikan lokan arkitekturon kaj folkloron. Vi povos partopreni lingvan festivalon kaj ekkoni multajn aspektojn de egalrajteco!

Krom laŭtemaj aranĝoj certe okazos multegaj E-diskutoj, belega ekskurso al salminejo Wieliczka, prezentado de E-filmoj kaj tutnoktaj diskotekoj. Vi spertos nekredeblan etoson!!! Vizitu la Nacian Parkon de Tatry-montaro kun lokaj bestoj: Ŝafoj, marmotoj, ursoj kaj ĉamoj. Renkontu esperantistojn el la tuta mondo.

Alta protektanto de la kongreso konsentis esti la prezidento de Pollando Aleksander Kwasniewski.

Ni invitas vin al Zakopane de 31 julio ĝis 7 aŭgusto 2005. Pliajn informojn vi trovos en la ttt-ejo <http://www.tejo.org/ijk>.

Zamenhof-tagoj 2004 en Kaunas

La 11-12-an de Decembro, 2004 en Kaunas okazis tradicia ĉiujara aranĝo de litoviaj esperantistoj "Zamenhof-tagoj 2004", dediĉita al 145-a datreveno ekde naskiĝo de Ludoviko ZAMENHOF. La aranĝon partoprenis pli ol 230 litovaj esperantistoj el 27 litoviaj urboj kaj loĝlokoj kaj gastoj el Rusio, Pollando, Latvio, Belorusio. En la programo estis prelego de Aleksander KORĴENKOV "Esperanto post la jaro 200", koncerto de flutistino Lidija GOMOLICKAITE-GRUDZINSKAITE kaj pianistino Ramute PECIULIENE, spektado de filmoj pri la 89-a UK en Pekino. Ewa BONDAR enmanigis atestojn al finintoj de diversnivelaj Esperanto-kursoj. Vespere okazis amatora koncerto de partoprenantaj esperantistoj. Sekvan tagon, dimanĉe, okazis diskutado pri la agado de litovaj esperantistoj ĉefe direkte al organizaj preparlaboroj al la 90-a UK en Vilnius sekvontjare. Krome, funkciis riĉa libroservo, eblis aboni diversajn Esperanto-revuojn kaj gazetojn, pagi membrokotizon de LEA, membriĝi al UEA k.s. Kelkaj dekoj de esperantistoj tuj aliĝis al la 90-a UK en Vilnius sekvontjare. Junularo daurigis la programon en tiel nomata Zamenhof-nokto.

Povilas JEGOROVAS [esper-inform]



*Scenoj el la
Zamenhof-
festo...*

*... en la pola
ambasadejo,
Kopenhago*

...



*... la 15-an
de decembro
2004.*

